Gerda Illerhues,

# Envintre

*tradukita de Manfred Retzlaff*

El arbar' nebulo rampas,
frostmalvarma estas ĝi.
Treme en la akra vento
svelta fleksas sin abi'.

Pluvo kiel larmoj falas
el la griza nubmalhel',
kaj fantome minacanta
estas supre la ĉiel'.

Vintrotagoj nin revigas
pri printempo kaj somer'.
Sed ankoraŭ daŭros longe,
ĝis revenos primaver'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Winter" de* Gerda Illerhues *(∗1930) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2000-02-28.*

*MR-218-1a / Arg-769-1542 (2013-01-12 08:33:43)*

*Verkis: Ilerhus', Gerdino.(Gerda Illerhues * 1930; Lehmbergstr. 50, D-46282 Dorsten, Tel. (02362) 2 27 62)*

Gerda Illerhues,

# Im Winter

Nebel kriecht aus dunklem Walde,
und im Tale steht der Frost.
Zitternd biegt die schlanke Tanne
sich im scharfen Wind aus Ost.

Regen fällt wie kalte Tränen
auf das weite, tote Land.
Und der grauverhang'ne Himmel
droht wie eine Geisterhand.

Wintertage wecken Träume
nach des Jahres schönster Zeit.
Meine Klage wird nicht enden,
denn noch ist der Frühling weit.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Gerda Illerhues *(∗1930).*

*Arg-769-1541 (2013-01-12 08:15:33)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon presita en la numero 2/2000 de la 13.01.2000, de la ĵurnalo „Landwirtschaftliches Wochenblatt" („Agronomia Semajnfolio"), (adreso de la eldonejo: Schorlemer-Str. 11, D-48143 Münster/Westf.*